

& La nobla arto:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 280 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:35> (

a;do /Lado mido TiTi TiiTi;Ti doLa Lado mido Ti Mi;Ti doLa Lado mido Ti Mi; doTi La La;Ti

(#Rekantaĵe: doLa Lado mido Ti Ti;Ti doLa Lado mido Ti Ti;Ti doLa Lado mido Ti Ti; Mido doTi La La)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 "El /sporto venas sana forto!" ;
Zorgema do pri sana forto ; Mi min
dediĉis al la sporto ; de boksarto.

(×:; **Ho savu min de la pereoj ; Se
batoj min mi tuj kabeoj ; Nenion mi
valoran kreoj ; Se mi nun paneoj.**)

'2 Kun nigra negro tiucele ; Mi studis
sporton laŭ la modo ; Li min instruis
senŝancele ; kun metodo.

'3 Dum en nudeco mi nedece, ;
Honteme antaŭ li promenis, ; Karnaĵon
mian li promese ; Ekzamenis... ..

'4 Mi time provis el la "Ringo" ;
Forkuri sen saluto. ; Sed trafis min jam
sur... laringo ; Uperkuto*!

'5 Mi lin rigardis senkomprene, ; Sed
tuj klerige nigra brako ; Kareson sendis
specimene ; Al stomako... ..

'6 Kaj plue li min sen rimarko ; Frakase
rulis jam sur planko, ; De tio restis eĉ...
postmarko; Sur bildflanko!

'7 Blasfeme tamen mi ekjuris ; Kaj
vane frapis sur rok-haŭton ; Dum li
responde min tamburis ; En knokaŭton!
.....

,& Apoteozo:

'8 Kaj dum mi kuŝis forŝveninte ; Mi
vidis stelojn briletantajn, ; Du-cent-mil
stelojn verd-kvinpinte ; Esperantajn!!
.....)